

# NORDFRANCA

279  
7.3.1981

# ESPERANTISTO



(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



## MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la sciigojn de la Norda Federacio kaj de la Grupoj

## REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements de la Fédération du Nord et des Groupes



Redakto kaj administrado: 33, rue Marceau  
ROSENDAEL - LEZ - DUNKERQUE (Nord)

C. VERNAY, Direktoro

G. VANHOVE, Administranto

M. DELAVIGNE, Respondeca redaktoro

*Redakta Komitato, redaktas*

Jarabono: Francujo 7 frankoj

aliaj landoj: 6 respondkuponoj aŭ egalvaloro

POSTĈEKKONTO: LILLE 403-50

ABONILO por

BULLETIN D'ABONNEMENT à

# ★ NORDFRANCA ESPERANTISTO ★

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj  
Revue mensuelle des Espérantistes du Nord de la France

Mi abonas por unu jaro al la gazeto *NORDFRANCA ESPERANTISTO*, komencante de la nuna numero kaj sendas entenate aparte { al la Administracio : S-ro VERNAY,

33, Rue Marceau, **Rosendaël-les-Dunkerque** (Nord),

la sumon da (1) \_\_\_\_\_

per (2) \_\_\_\_\_

Nomo {  
Nom \_\_\_\_\_

Plena adreso {  
Adresse complète \_\_\_\_\_

Je déclare m'abonner pour une année au journal *NORDFRANCA ESPERANTISTO*, à partir du présent numéro et adresse { ci-inclus { sous pli fermé } à l'Administration : M. VERNAY

33, Rue Marceau, **Rosendaël-les-Dunkerque** (Nord),

la somme de (1) \_\_\_\_\_

sous forme de (2) \_\_\_\_\_

Le \_\_\_\_\_ 1936

Subskribo {  
Signature \_\_\_\_\_

## Samideanoj !

Commandez vos CARTES DE VISITE, de préférence à l'imprimeur de votre Bulletin...

### Imprimerie Commerciale

LONGPRÉ-LES-CORPS-SAINTS (Somme)

Tous les Imprimés  
nécessaires aux Groupes

### Cartes de visite

le 100 : 10 francs — les 50 : 7 francs  
avec étoile verte : 1 franc en sus

ENVELOPPES - le 100 : 5 francs

Envoi franco contre mandat-poste

Prière d'écrire lisiblement  
et de bien indiquer le prénom



N° 1 Eugène Hambart

2. M<sup>rs</sup> M<sup>me</sup> Lesa

3. M<sup>rs</sup> & M<sup>me</sup> GUILLAUME

4. PIERRE TRANCARD

# AUX ÉLÈVES

## des Cours d'Esperanto

---

A votre intention " Nordfranca Esperantisto ", sous le titre de " Ni ! la Komencantoj ! " publie chaque mois un cours pour débutants.

Nous avons encarté la première leçon dans le présent bulletin n° 2, qui exceptionnellement vous est distribué gracieusement à titre de propagande.

" Nordfranca Esperantisto " est une revue spécialement écrite pour les espérantistes du Nord, et, pour vivre, a besoin du concours absolu de tous.

**ABONNEZ-VOUS !**

Remplissez le bulletin ci-joint.

Vous aurez ainsi, chaque mois, en vous exerçant à la lecture de l'esperanto, le plaisir de lire des articles très intéressants.



## Ni ! la Komencantoj ! (1)

— Bonan tagon al vi, karaj novaj infanoj de nia esperanta familio !

— Saluton, estimata SAMIDEANO.

— Ĉu vi estas kontentaj PRI VIAJ UNUAJ esperantaj lecionoj ?

— Ho, jes ? CERTE, Sinjoro Senhar. La konversacioj estas tre gajaj kaj tre interesaj.

**KIU ?** — Mi scias !... MI, malnova esperantisto estas feliĉa KIAM mi povas SIDI en la granda ĉambro de nia bela URBODOMO kaj aŭskulti kiel vi :

— Kio estas vi ?  
— Ĉu mi estas tablo ?  
— Ĉu la seĝo estas floro ?

TIAM mi FORGESAS KE mi estas SEPDEKJARA, kaj, forte, kuraĝe, elegante kaj esperante, mi respondas laŭtvoĉe :

— Mi estas rentulo...  
— Ne, vi ne estas tablo, sed vi estas instruistino...

— Ne, la seĝo ne estas floro, sed ĝi estas meblo...

kaj mi ridas KUN vi miaj karaj novaj amikoj. TIAM mi estas juna, tiam mi estas gaja

« Vivu Esperanto ! »

— Vivu Esperanto, vivu la rekta metodo, vivu la bonhumoro !

— Mi vidas ke vi estas JAM FERVORAJ esperantistoj kaj kuraĝaj

lernantoj. Vi NE NUR komprenas, sed vi parolas ! Mi GRATULAS al vi.

— Dankon, Sinjoro Senhar, jes ni parolas ni komencas paroli. Niaj frazoj ne estas longaj sed nia kuraĝo estas granda.

— Bonaj amikoj, dankon, dankon : via energio, via entuziasmo estas noblaj. Mi admiras vin kaj mi deziras al vi « Bonan sukceson ! »



Ĝis revido...

Verda Kato 

### KLARIGOJ

**samideano** - sam-ide-ano : partisan de la même idée. Camarade espérantiste.

**urbodomo** - urbo : ville - domo : maison. l'hotel-de-ville ; la mairie.

**mi forgesas ke** : j'oublie que...

**mi gratulas al vi** : je vous félicite...

**sepdekjara** : âgé de soixante-dix ans.

**unuaj** : premières ; unu ; un ; unua premier.

**fervoraj** : fervents ; **fervoro** : ferveur.

**miaj, niaj, viaj** : mes, nos, vos ; **nia** : notre

**pri** : au sujet de - **certe** : certainement

**kiam** : quand, lorsque - **tiam** : alors

**sidi** : asseoir - **tiel** : comme, ainsi que

**kun** : avec - **rentulo** : rentier - **jam** : déjà

**ne nur** : non seulement.

**CONSEIL IMPORTANT** : Lisez et relisez à haute voix ce dialogue avec un « samideano » qui vous donnera la réplique comme au théâtre ou en conversation, accentuez fortement l'avant-dernière syllabe de chaque mot et articulez toutes les lettres ; ce sera un admirable et efficace encouragement à la parole.

(1) Sous ce titre nos lecteurs trouveront chaque mois un article spécialement rédigé pour les débutants de l'année en cours. Ce premier entretien, très bref assurément, puisque les connaissances de nos nouveaux adeptes sont rudimentaires, ne contient, on en jugera, aucune difficulté pour les commençants. Des explications sommaires accompagnent le texte et peuvent être étudiées comme une leçon. L'auteur a choisi le genre dialogue qui, très facile et très agréable à lire, complète heureusement les leçons de conversation en usage dans la plupart des groupes espérantistes modernes du monde entier convaincus de l'excellence de la méthode créée par notre maître Andréo CSEH.

# NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

PROPAGANDO  
PROPAGANDE

INSTRUADO  
ENSEIGNEMENT

AKTUALAĴO  
ACTUALITE

LITERATURO  
LITTÉRATURE

Kopirajto de la enhavo rezervita. Manuskriptojn kaj sciigojn oni devas sendi nur al tiu adreso : C. VERNAY, MALO-LES-BAINS (Nord). Ni ne resendus la manuskriptojn. — La Redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn. — *Les auteurs sont seuls responsables de leurs articles.*



D-ro L. L. ZAMENHOF

(1859-1917)

Kreinto de Esperanto



## ★ LA ESPERO ★

### I

En la mondon venis nova sento,  
Tra la mondo iras forta voko,  
Per flugiloj de facila vento,  
Nun de loko flugu ĝi al loko.  
Ne al glavo sangon soifanta  
Ĝi la homan tiras familion ;  
Al la mond' eterne militanta.  
Ĝi promesas sanktan harmonion.

### II

Sub la sankta signo de l'espero  
Kolektiĝas pacaj batalantoj,  
Kaj rapide kreskas la afero  
Per laboro de la Esperantoj.  
Forte staras muroj de miljaroj  
Inter la popoloj dividitaj ;  
Sed dissaltos la obstinaj baroj  
Per la sankta Amo disbatitaj

### III

Sur neŭtrala lingva fundamento  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familian.  
Nia diligenta kolegaro  
En laboro paca ne laciĝos,  
Ĝis la bela sonĝo de l'Homaro  
Por eterna ben' efektiviĝos.

L.-L. ZAMENHOF.



## ZAMENHOF

1859 - 1917

Mi vidis Lin. Antaŭ tridek jaroj, mi estis novevarbita Esperantisto : de la monato Februaro 1905, en la Arras'a grupo, ni diligente lernis la helpan lingvon. Tial, ne atente nian nespertecon, kelkaj el ni tamen kurage decidis viziti la Unuan Kongreson en Boulogne-sur-Mer. Eble, malantaŭ mia ŝajna energio, kaŝiĝis iom da timo, sed ni ne tro hezitis. Ni deziris konstati la realecon de nia revo : ni allogis la ĉeesto de tiu, kiun oni jam eknomis « LA MAJSTRO ».

Dum tiuj tagoj, Boulogne estis ĉefurbo de Esperantujo : de la unuaj tagoj, vidiĝis ke la kunvenego estos sukceso. Antaŭ la oficiala parto, ni certe renkontis eksterlandajn samlandanojn, kun kiuj ni ekspertis niajn kunojn, sed ni sciis, ke ne malproksime de ni estas la aŭtoro de Esperanto kaj la « Interna Ideo » iom post iom nin ekkaptis. Senpacience, ni atendis la momenton, kiam ni povos vidi « LIN ».

Kaj tio okazis ! La 6<sup>a</sup> de Aŭgusto 1906, sabaton vespere, la favorigitaj esperantistoj plenigas la teatron.

Unuanime starante, ili bruege aplaudas je la alveno de la oficialuloj ; ĉiuj okuloj serĉas la Geneslon, kies scienco kaj laborego donis al ili la belan interkomprenilon. Meze de eminentuloj, ili ekvidas malgrandan viron, kun modesta sinteno, kiu ŝajnas iom honti pro sia veno meze de gravaj viroj.

Sed, kiam li levas la okulojn, en

kiuj rebrilas emocio, kontento, ĝojo, tiam ĉiuj komprenas la forton de lia volo, kiu kondukas lin al la unua sukceso. Li estas la centro de ĉiuj rigardoj : aŭskultante la parolantojn, oni rigardas nur Lin. Jen lia parolovico. Antaŭ ol li parolos, tondraj aplaŭdoj denove bruegas : poste, profunda silento. La ĉeestantaro aŭdas nun klaran, momente pro emocio malfortan voĉon : ĉiuj aŭskultas senspire, kaj, mirakle, ĉiuj komprenas ! En multaj okuloj, vidiĝas kvazaŭ religia emocio...

Neforgeseblaj memoroj ! Kiom da paĝoj oni jam verkis pri Li, kiom multe oni ankoraŭ verkos !

Okaze de la reveno de lia naskiĝdato, ĉiuj esperantistoj devas turni sian penson al la glora elpensinto de Esperanto. Tiuj, kiuj havis la feliĉon lin persone vidi, elvokos la memoraĵojn pri la iamaj renkontoj ; vi ĉiuj, karaj samideanoj, kiuj pli malfrue eniris la vicojn de la pacaj batalantoj povos ankaŭ ĝui la spiriton de la Movado, legante la nemortebajn verkojn de Zamenhof.

Dum parolado, S-ro Bastien diris ke « post nelonga tempo, la tuta mondo starigos oran kronon je la homara bonfaranto ». Ni estu, malnovaj kaj novaj Esperantistoj, la laborantoj de tiu memorigo.

La 15<sup>a</sup> de Decembro estu por ni benita tago.

P. BENOIT.

★ Ni semas kaj semas neniani laciĝas  
Pri l'tempoj estontaj pensante ;  
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas  
Ni semas kaj semas konstante.

L.-L. ZAMENHOF.





## Ni ! la Komencantoj ! (1)

Karaj novaj samideanoj, mi salutas VIN ! Ĉu vi komprenas ? Jes ! ĉar vi estas jam ĈIUJ, bonaj esperantistoj. Mi SCIAS, kaj mi gratulas VIN.

— KIAL DO vi gratulas ?

— ĈAR vi meritas gratulojn... La malgranda FINGRO de la maldekstra mano parolas al mia orelo kaj diras ke vi faras



MULTAJN progresojn.

Via profesoro, mia granda amikino, estas tre feliĉa kiam vi parolas forte, kuraĝe, elegante kaj esperante en la konversacio.

NUN, ni ricevas Nordfranca Esperantiston, ĈU NE ? Mi tre ŝatas tiun novan agrablan gazeton. Ĉu ĝi plaĉas al vi ?



Mi scias, kaj la afabla ĉefredaktoro scias ankaŭ ke vi ne estas sufiĉe LERTAJ por kompreni ĉiujn artikolojn de la gazeto... sed nia ĉefredaktoro kiu havas tre molan koron (mi petas, silentu, ne ripetu TION, ĉar estas grava sekreto !) vizitis la Verdian Katon, kaj diris al ĝi :

— « Kara Verda Kato, mi estas malfeliĉa homo, mi ploras, mi ne dormas dum la nokto, mi ne plu ridas dum la tago. La novaj lernantoj ne povas kompreni la malfacilajn artikolojn de la gazeto. Mi deziras por ili CIUMONATE, specialan paĝon,



— « Kara Verda Kato, mi estas malfeliĉa homo, mi ploras, mi ne dormas dum la nokto, mi ne plu ridas dum la tago. La novaj lernantoj ne povas kompreni la malfacilajn artikolojn de la gazeto. Mi deziras por ili CIUMONATE, specialan paĝon,

tre facilan, tre interesan, ĉu vi volas SEKIGI miajn larmojn kaj konsolamian koron ».

Kaj la Verda Kato, kiu havas ankaŭ molan koron, respondis :

— « Dormu bone dum la nokto, ridu multe dum la tago, ne plu ploru ĉarma amiko, mi HELPOS vin, mi VERKOS la specialan paĝon por la komencantoj ! »

Kaj NUN, la juna, ĉarma eleganta ĉefredaktoro de Nordfranca Esperantisto estas feliĉa kiel REĜO kaj gaja kiel FRINGO... Sed Verda Kato CERBUMAS kaj skribas... skribas por vi. Malfacila laboro, ĉar en via kapo, ne estas multaj vortoj, ĉu ne ?



TAMEN la afabla Verda Kato kuraĝe volas konduki vin sur la VOJO de Esperanto ; Ĝi estas via bona amiko, sincera kaj SINDONEMA, kiu ŝatas kaj praktikas la belan frazon de « Flandra Antikvaĵo » :

« Estas necese helpi la ETULOJN por SUPRENIRI ».



« Il faut aider les petits à monter »

Mi dankas vin PRO via ATENTO. Vi meritas REKOMPENCON...

Vi tre ŝatas anekdotojn, divenaĵojn... mi ankaŭ... Jen :

### EN LA ERZAMENO

— Profesoro : Mi opinias ke la demando estas malfacila.

— Kandidoto : Ne ! sinjoro, ne la demando estas malfacila, sed la respondo.

Verda Kato

## KLARIGOJ

Mi gratulas VIN : mi gratulas al vi — al : à — ĈIUJ : tous — ĈAR : car, parce que — MI SCIAS : je sais — KIAL DO : pourquoi donc — FINGRO : doigt — MULTAJ : nombreux — MULTE : beaucoup — NUN : maintenant, à présent — ĈU NE ? : n'est-ce pas ? — AFABLA : aimable — LERTA : habile, adroit — TIO : cela — CIUMONATE : chaque mois, mensuellement — SEKIGI : sécher — HELPI : aider — Verbes : AS, présent ; LI PLORAS : il pleure — IS : passé ; LI VIZITIS : il visita — OS : futur ; MI HELPOS : j'aiderai — VERKI : écrire, rédiger — REĜO : roi — FRINGO : pinson — CERBUMI : se creuser la cervelle — TAMEN : cependant, pourtant — VOJO : voie, chemin — SINDONEMA : dévoué — La ETULOJ : les petits, les débutants — SUPRENIRI : monter — PRO : à cause de, en raison de — ATENTO : attention — DIVENI : deviner — DIVENAĴO : devinette — JEN : voici.

ATENTU ! ATENTU !  
HELMARKU BONE LA AKUZATIVOJN...  
NE FORGESU LA GRAVAN LITERON N

Ĝis revido !

**CONSEIL IMPORTANT :** Lisez et relisez à haute voix ce dialogue avec un « samideano » qui vous donnera la réplique comme au théâtre ou en conversation, accentuez fortement l'avant-dernière syllabe de chaque mot et articulez toutes les lettres : ce sera un admirable et efficace encouragement à la parole.

Mi petas, bonvolu rigardi la aliajn klarigojn en la unua numero kiu aperis la unuan de novembro.

(1) Sous ce titre nos lecteurs trouveront chaque mois un article spécialement rédigé pour les débutants de l'année en cours. Ce premier entretien, très bref assurément, puisque les connaissances de nos nouveaux adeptes sont rudimentaires, ne contient, ou en jugera, aucune difficulté pour les commençants. Des explications sommaires accompagnent le texte et peuvent être étudiées comme une leçon. L'auteur a choisi le genre dialogue qui, très facile et très agréable à lire, complète heureusement les leçons de conversation en usage dans la plupart des groupes espérantistes modernes du monde entier convaincus de l'excellence de la méthode créée par notre maître Andréo CSEH.

## Esperantista propaganda festo

...ANTAŬ 28 JAROJ



Memoraĵo de Esperantista Festo prezidita de profesoro Carlo Bourlet, en Armentières, en la jaro 1908. Tiuj knabinoj, lernantinoj de Esperanto-kurso en Nieppe, gvidita de nia samideanino S-ino Lotthé, dancis gracie baleton, kiu finiĝis per prezentado de nia « Verda Stelo »



## Teruraj Infanoj

Moniko estas kvarjara knabino kaj ŝia frato Gerardo, dekjara. Ili patrino estas akuŝistino. Ŝi ordonas al la infanoj resti silentaj en lia ĉambro.

Moniko en sia lito ludas gentile per sia pupo. Turnante sin al la frato, ŝi diras serioze :

— Gerardo, donu al mi la lulilon, mi ĵus akuŝis!

(Autentika fakto kiu okazis en Longpré-les-Corps-Saints).

★

Sesjara knabo alvenas tre malfrue en lernejon. La instruisto demandas lin :

— Kial vi do alvenas tiel malfrue ?

— Ĉar, sinjoro instruisto, de hodiaŭ matene mi havas novnaskitan frateton.

— Ho ! Vi ne devas paroli tiel malbele. Vi devas diri : mia patro « aĉetis » infaneton al mia patrino.

— Sed, ĉu mia patro estas devigata « aĉeti » infaneton, kion li mem estas kapabla fari ?

★

## SENLABORULO

Vagulo « tiras » policiston :

— Sinjoro policisto, kiam oni trovis vin, ĉu oni devas ĝin redoni ?

— Jes, ja !

— Bone, jen estas : mi « trovis » laboron.

■ ■ ■

## Konsiloj al Propagandistoj

Kalo estas malgrava kriplajo tute forlasata de kuracistoj ; sed Esperanto kongigas al ni multajn proprajojn de kalo :

Ekzistas sonora kalo, ĉar oni konas **kalezonon**.

Ekzistas kalo sufiĉe granda por enteni maron, ĉar oni parolas pri **kalmaro**.

Kelkafoje kalo estas loĝejo de malagrabila inselto ; tiu-ĉi estas la **kalkulo**.

Homo posedas grandan, preskaŭ magian povon : ekzemplo : por krei arbon, ne necesas esti fakiro ; prenu unu bukon kaj prenu duan bukon tute similan al la unua ; tiu-ĉi estas **sambuko**.

Por semmateriaĵi aeron, jen simpla rimedo : spiru ĝin kaj ĝi fariĝos **spirita**.

Tiuj mirakloj kondukas min paroli pri kreinto de l' mondo. Mi faros ĝin tute senpartie por eviti vigligi ĉiun pasion.

Oni diras ke ŝtono povas havi nenian senton ; tamen ekzistas almenaŭ unu ŝtono kiu posedas religian senton, estas la **diamanto**.

Jen rimarko kiu diferencigas nete la Kreinton de homo :

Kiam homo verkas versojn en strofojn, ĝi ricevas poeziaĵojn ; kiam Dio agas same ĝi ricevas... distancojn.

Kiam Dio faras geston, ĝi ricevas **di-geston**.

A. CHAIGNEAU.

(daŭrigota)

■ ■ ■

## MODO...

### Triumfo de la Baska Ĉapo

De post 20 jaroj baska ĉapo konis eksterordinaran sukceson. Ĝis tiu epoko oni estis vidinta ĝin nur sur kapo de kaprinolaktovendistoj. Dum la milito, vunditoj loĝataj en Pireneoj ĝin kunportis en siajn provincojn.

Ĉu la baskan ĉapon oni taksis pli praktika ? Certe, ĉar ĝie oni elektis ĝin. Hodiaŭ, preskaŭ ĉiuj socioj preferas uzas ĝin, el malsamaj koloroj, ornamitaj per diversaj ornamatoj. Studentoj kaj sportuloj precipe kondukis baskan ĉapon ĝis triumfo.

Ofte oni vidas tutan familion kiu surmetas ĝin. Eĉ esperantistoj sekvas tiun modon. Tre certe vi konas samideanojn, aŭ almenaŭ iun eminentan samideanon, kiu surmetas nur tiun kapveston, eĉ en gravaj okazoj. Cetere li baptis ĝin per speciala nomo...

Pli praktika ankoraŭ estas baska ĉapo por sinjoroj kiuj ne deziras elkovri (salutante iun) komencigantan senbarecon.

Malofte modo estis sekviata kun tiu unueco. Kiam baska ĉapo venkos kaskedon de la antaŭurboj, ĝia triumfo estos plenumata. Ĝi regos sur tuta Francujo !

A. T.

Ne por ridi, sed xerize...

## POR LA MANĜODELIKATULOJ

### Recepto : FROMAĜA ŜVELAĴO

Faru saŭcon per kvindek gramoj da butero, kvindek gramoj da faruno, kvarona litro da lakto. Post kuirado, almetu du ovoŝlavoĵojn, okdek gramojn da raspita svisa fromaĝo, kaj line tri aŭ kvar ŝaumkirlitajn ovoblankajojn. Kuirigu per modera fajro dum duonhora kaj manĝu varmega.

SUKERA ONKLINO.

(daŭrigota)

BONAN APETITON ! (La Redakcio).

## Gramatika Angulo.

### La clarté française et la clarté espérantiste

*Une partie faible de la syntaxe française, c'est celle qui concerne l'emploi des possessifs son, sa, ses, leur, leurs.*

*Une partie admirable de la syntaxe espérantiste, qui tient dans les deux premières lignes de la cinquième des fameuses seize règles de l'Espéranto, c'est celle qui concerne l'emploi des possessifs sia, lia, ŝia, ĝia.*

*En français, l'équivoque est continuelle : en esperanto l'équivoque est impossible.*

Exemples :

— Pierre vint discuter avec Paul son projet de voyage, A qui le projet ? S'il est à Pierre, sujet de vint, l'esperanto dit **sia**. Si le projet est celui de Paul, non sujet de vint, l'esperanto dit **lia**.

— Le vieillard aimait déjà Rastignac et pour sa fille et pour lui (Balzac). A qui la fille ? Au vieillard ? **Sia** filino. A Rastignac ? **Lia** filino. Pour qui lui ? Pour le vieillard ? **Por** si. Pour Rastignac ? **Por** li.

— L'officier recueillit sa sœur avec son enfant. A qui l'enfant ? A la sœur ? **Sia** infano, la infano de ŝi l'enfant d'elle. A l'officier ? **Sia** infano.

— Le préfet, n'ayant pu s'entendre avec le maire, a délégué ses pouvoirs à une commission. A qui les pouvoirs ? Au préfet ? **Sia** povo. Au maire ? **Lia** povo.

*Et les phrases qui précèdent ne sont évidemment pas fabriquées à plaisir pour le besoin de la cause. Elles sont de l'usage courant. On a vu ou entendu cent fois les pareilles. Les plus grands et les plus habiles écrivains n'échappent d'ailleurs pas à l'équivoque.*

*Écoutez Corneille dans Polyeucte (Acte III, scène 4).*

FÉLIX. — Albin, en est-ce fait ?

ALBIS. — Oui, Seigneur, et Néarque a payé son forfait.

FÉLIX. — Et notre Polyeucte a vu trancher sa vie.

A qui la vie ? à Néarque ? (ce qui est le cas) Lian vivon. A Polyeucte ? (ce qui ne serait pas absurde en négligeant le contexte) Sian vivon.

*Écoutez Racine dans Britannicus (Acte III, scène 1).*

Pallas obéira, Seigneur. — Et de quel vil

Ma mère a-t-elle vu confondre son orgueil ?

A qui l'orgueil ? A Pallas ? **Lia**. A ma mère ? **Sia**.

*Dans Andromaque (Acte III, scène 4).*

J'ai su de mon Hector toi procurer l'appui. Vous pouvez sur Pyrrhus ce que j'ai pu sur lui. Que craint-on d'un enfant qui survit à sa perte ?

La perte de qui ? D'un enfant ? **Sia**. La perte d'Hector ? **Lia**.

*Dans Bérénice (Acte II, scène 2).*

Antoine qui l'aima jusqu'à l'idolâtrie. Oublia dans son sein sa gloire et sa patrie. Sans oser toutefois se nommer son époux. Rome l'alla chercher jusques à ses genoux. Et ne désarma point sa fureur vengeresse. Que'elle n'eût accablé l'amant et la maîtresse.

Étudiez ces textes, et cent autres au hasard, comparez impartialement l'emploi de son, sa, ses, en français avec l'emploi de sia, lia, en esperanto, et dites de quel côté est la clarté et la précision.

La plus claire, la plus précise, la plus logique des langues, c'est l'Espéranto.

H. M.

★

## UTILECO DE LA VORTO « SIA »

### Miskompreno kiu ne povas okazi en Esperanto

Antaŭ ne longe, franca militŝipo vizitis iun havenon, kiu ne bone konas ; kaj la ŝipistoj profitis liberan tempon por viziti la urbon, kaj kompreneble ties drinkejojn, kie okazis sufiĉe multaj disputoj kaj bataloj. La loĝantoj plendis akre pro la tro fortaj tumultoj ; tial, la morgaŭon, la ŝipestro kunvokas la tutan ŝipanaron sur la ferdeko, kaj severe riproĉas pro la malbona surtera konduto. Por precize resumi la admonon, la kapitano konkludas : — « Se civilulo ekhverelas kun vi, restu kvietaj ; eĉ se li krias al vi malagrablaĵojn, silentu. Ekzemple, se vi estas en drinkejo, en tiu okazo, ŝipano havas nur unu devon : **BOIRE SON VERRE** kaj rapide foriri. Ĉu vi bone komprenas ?

Ekzemple, vi, Lagliro, ĉu vi bone komprenas ? diru al mi. Vi sidas en drinkejo, civilulo incitas vin, diras al vi malagrablaĵojn, kion vi faras ? »

Senbezite alvenas respondo :

— **JE BOIS SON VERRE**, kaj mi rapide foriras. **A. C.**

*NOTO por francoj.* — En franca lingvo ne ekzistas diversaj vortoj por esprimi LIA kaj SIA. **BOIRE SON VERRE** signifas ankaŭ trinki LIAN kaj SIAN glason. La kapitano diris : **TRINKI SIAN GLASON** kaj la ŝipano miskomprenis : LIAN GLASON. (Mi trinkas lian glason).

Ne sufiĉas legi vian bultenon. Vi devas ankaŭ paroli pri ĝi al viaj amikoj kaj konatoj. Ĝia sukceso estos via sukceso.

## LA BUDAPEŝTA POSTKONGRESO

Fariĝas ĉiam pli kutimo plilongigi la kongresojn per antaŭ- kaj postkongresoj. La kongresorganizantoj de Vieno mem ekzemple aranĝis grandan aŭtobusan vojaĝon tra Aŭstrio antaŭ kaj post la viena kongreso. La esperantistoj de Budapeŝt ankaŭ utiligis la okazon kaj aranĝis en sia urbo antaŭ- kaj postkongreson. Jam ilia antaŭkongreso estis tre bone vizitata, sed la postkongreso fariĝis vere impona aranĝo kun partoprenantaro proksimume ducent personoj. Inter ili ankaŭ estis tre multaj francoj, precipe el Lyon. La postkongreso komenciĝis la saman tagon kiam la universala kongreso finiĝis kaj sabate vespere la aliĝintoj alvenis per la plej diversaj transportiloj de Vieno en Budapeŝt. En la stacidomo kaj ĉe la ŝipalvenejo atendis multaj lokaj esperantistoj — ilia ĉefo estis kongresaranĝanto D-ro Szilágyi — kiu kore akceptis la alvenantojn. La saman vesperon okazis interkonatiĝa vespero en la restoracio de la parlamento, kie jam ekregis tiu kora atmosfero kiu distingiĝis entute la budapeŝtan postkongreson kaj kiu estas dankinda al la granda ĝentileco de niaj hungaraj samideanoj.

Dimanĉe la 16<sup>a</sup> de aŭgusto matene okazis la unua kaj lasta kongresa kunsido, kiu parte estis landa kunveno de la hungara Esperanto-Societo, parte internacia kunveno honore al niaj poetoj Baghy kaj Kalocsay, kiuj okaze de la postkongreso, festis la jubileon de sia 25 jara esperantistiĝo. La eksterlandaj esperantistoj tie eldiris salutojn por honori la gastigantojn kaj la jubileulojn. Ankaŭ generalo Bastien de U. E. A. sendis siajn salutojn kaj la seligon ke la komitato de U. E. A. nomis Baghy kaj Kalocsay honoraj membroj por danci digne por ilia granda laboro kaj merito en la movado. Baghy dankis kaj diris ke honorigo al la poetoj de Esperanto estas honorigo al ĝia literaturo sen kiu nia lingvo ne povas vivi.

Tagmeze la tuta postkongresanaro ĉeestis la gvardiŝanĝon en la centro de la urbo kaj poste vizitis la parlamenton, kiu estas fame konata kiel unu el la plej belaj konstruaĵoj en la tuta mondo. Posttagmeze okazis aŭtobusa rondveturo tra la urbo por viziti faman hanejon kaj la kastelan monton kun la kronada preĝejo kaj la fiŝista bastiono, de kie oni belege povas vidi la tutan urbon kun la majesta Danubo kiu, superata de imponaj ĉenpontoj, trafluas tiun grandiozan urbon. Je la kvina oni kune ekveturis sur la Danubo por agrabla promenadveturo en dimanĉa vetero. Vespere oni ĉeestis trombonan koncerton sur la fiŝista bastiono ĉe kiu oni rezervis al la esperantistoj la plej

bonan lokon sur alta turo, kie oni, krom plej bone povi aŭskulti la muzikon, havis la nomitan belan rigardon super la iluminita urbon.

Lunde matene oni denove rondveturis kaj rigardis vidindaĵojn, dum la posttagmezo estis lasata al la propra iniciatemo de la unuopaj kongresanoj. Vespere la granda festkunveno por la festado de la Baghy-Kalocsay jubileo estis aranĝata en granda salono en la muzika akademio: Unue estis prezentata malnova teatraĵo de Julio Baghy, kiun ludis kun granda sukceso tri amatoraj geaktoroj budapeŝtaj. Estis fraŭlino Erzsébet Bodnár



BUDAPEŝT — Elizabel-Ponto

kaj s-roj Gjurkovics kaj Gerő. Reĝisoris Baghy mem. D-ro Szilágyi transprenis la malfacilan taskon fari la leŝparoladon, sed li tre bone tiris sin el la afero troigante tiom la meritojn de la jubileuloj Baghy kaj Kalocsay kaj laŭdegante ilin ĝis ili post vanaj protestoj tiris la malfacilan oratoron de lia katedro kaj for malantaŭ la kurtenon. Oni multe ridis. Baghy devis kompense deklami kelkajn poemojn kaj anstataŭ Kalocsay kiu estis tute raŭka, deklamis samideano Halka kelkajn poemojn. Kantoj kaj tre bona dancnumero plenigis la sukcesplenan programon. La budapeŝtaj samideanoj, kies nombro cetere estas tre alta, pruvis, per tiu programo kaj kiel mi ankoraŭ poste havis okazon konstati, ke ili estas tre altnivelaĵ esperantistoj. Ankaŭ la lingvon mem ili majstras kun enviinda perfekteco.

La sekvantan tagon, la 18<sup>a</sup> de aŭgusto, la postkongreso oficiale finiĝis, sed tre multaj el la eksterlandanoj ankoraŭ restis unu tagon, du tagojn, aŭ eĉ ankoraŭ pli. La plej fidela gasto, nederlanda esperantistino, restis laŭ mia scio ĝis la 15<sup>a</sup> de septembro. La 19<sup>a</sup> de aŭgusto alvenis eĉ nova karavano de estonoj, kiuj denove havis kvazaŭ propran postkongreson, tiel ke la esperantista vivo estis

eksterordinare vigla dum la tuja aŭgusto en Budapeŝto. En la jam internacie konata klubo Esperantista Rondo Amika, kiu disponas pri propra tutjare luata klubejo kaj estas la kreaĵo de Baghy, ankoraŭfoje kolektiĝis la tuta postpostkongresanaro kaj oni tie pasigis tre belan vesperon en esperantista atmosfero.

Mi havis la plezuron resti en Budapeŝto ĝis la fino de aŭgusto, sed mi ne estis la lasta el la eksterlandanoj kiuj forvojaĝis, kontraŭe oni eĉ parolis pri la alveno de nova grupo de eksterlandaj esperantistoj.

Esperable la esperantista kolonio en Budapeŝto ankoraŭ longe floris.

Arthur BAUR (Zurich).

## LA FAMILIO

### DE "Nf.E."

Antaŭ sia naskiĝo Nf.E. jam havis sian baptopatrinon. Tuj post la apero de la unua numero sin anoncis ankaŭ malavara baptopatro S-ro Humez kiu ne forgesis aceti grandan kvanton da sukermigdaloj. Jen baptopatro, kiu konas bonege la kutimojn.

Nun ni atendas ankoraŭ la alvenon de aliaj familianoj por poste inde festi la naskiĝon de la esperantista bubo.

Avo (S-ro D...), onklo (S-ro Houzé) kuzo (S-ro Dumarquez) sciigis nin pri sia certa partopreno en la festo, sendante antaŭe la kutiman donacon por la infano.

Por ke la familio estu kompleta mankas ankoraŭ: avino, onkloinoj, kuzinoj, genepoj kaj... «onklo el Ameriko».

En la venonta numero ni raportos pri la baptofero de Nf.E. kaj publikigos bildon de la familio.

Malavaraĵoj de Nf.E. ne forgesu sendi vian fotografon (eĉ malgrandan) samtempe kun la donaco al la infano.

Al ĉiuj geparencoj, Nf.E. sendas dankan kison.

LA GEPATROJ.

## Ah ! ces Lyonnais !

*L'enquête entreprise auprès des Parlementaires par nos amis de Lyon, initiative que nous avons soulignée dans notre précédent numéro, se continue. Vingt nouvelles réponses sont parvenues dont dix-neuf favorables (émanant de onze députés et huit sénateurs) et une défavorable venant de... (attention, tenez-vous bien !)* M. Delesalle, sénateur du Pas-de-Calais.

*Désormais, lorsque j'entendrai dire que le Nord montre l'exemple, il me sera donc permis de me montrer un peu sceptique...*

*Voici comment se décomposent les 175 réponses reçues jusqu'à ce jour :*

	FAVORABLES	DÉFAVORABLES
Sénateurs ..	25	5
Députés .....	141	4
	166	9
	175	

*A la suite d'une lettre qu'il avait adressée au Ministre de l'Éducation Nationale, le Président du Club Universitaire Espérantiste de Lyon et la Région, M. le Professeur Philip, député du Rhône, a reçu de M. Jean Zay la réponse suivante :*

*Monsieur le Président,*

*Je suis heureux de vous informer que, par circulaire en date du 30 octobre 1936, j'ai rappelé aux autorités académiques que les dispositions de la circulaire du 19 juin 1925 de l'un de mes prédécesseurs, demeurent en vigueur.*

*Les locaux scolaires peuvent donc être prêtés aux Associations Espérantistes en vue de l'organisation de cours, sous réserve des précautions et garanties d'usage et, étant bien entendu que l'enseignement de l'Espéranto ne doit servir de couverture à aucune propagande.*

*Agréé, etc...*

Signé : Jean ZAY.

*Voici une nouvelle qui réjouira de nombreux organisateurs dans notre région, celle qui a eu le plus à souffrir de dispositions ministérielles contraires.*

C. V.



# Vivo de la Grupoj

\*

**ABBEVILLE.** — Mercredi le 25 novembre a eu lieu une réunion du groupe pour la reprise des cours. Une classe est mise à notre disposition par un directeur d'École. Suite aux nombreuses demandes, nous envisageons une bonne reprise dans la première semaine de décembre.

**ALBERT.** — Post unumonata klopodado S-ro Brunet sukcesis trovi en tiu urbo 4 interesatojn kaj 2 kunlaborantojn. Vasta propagando estas tuj ekkomencanta. Baldaŭ, kunveno en kiu partoprenos S-roj Brunet kaj Stuit. Ili intencas aranĝi Cseh-kurson.

**ANZIN.** — La 11<sup>o</sup> de novembro nia grupo partoprenis kun aliaj urbaj societoj la memorigon de la datreveno de la militdesigo. Nia verda standardo, emblemo de la Paco, kliniĝis dum la silenta momento al la monumento de promilitaj mortintoj.

La Cseh-kurso gvidata de F-ino Hansen daŭras sukcesplene; ŝi seĉipovis krei inter ŝi kaj la gelnantoj vere fratan atmosferon. Baldaŭ, la kurso estos finita kaj pro tio nia afabla profesorino forlasos nin por gvidi alie kursojn, ni organizos intencojn al ŝi ĝojan feston, kunvenante la profesorinojn, la gesamideanojn de la regiono kaj la gelnantojn, la 6<sup>o</sup> de decembro. — A. L.

**ARRAS.** — La vivo de tiu grupo neniam estis tiel vigla kiel nuntempe. La komitato intencas aranĝi prelegon de S-roj Humez pri gastronomio kaj Cont, pri Varsovio.

Mardon la 10<sup>o</sup> de novembro komenciĝis la nova kurso por komencantoj gvidata de S-ro Collot ĉumarde je la 18<sup>o</sup> k. 30, en la Komerca ĉambro.

Komence de novembro, S-ro Stuit ekgvidis kurson por skolttoj.

Daŭriga perfektiga kurso estas gvidata ĉiumerkrede je la 20<sup>o</sup> k. 30, en Komerca ĉambro, de S-ro Stuit.

Por la malnovaj kaj tre lertaj esperantistoj (10 posedantoj de A. pri Kapableco, 3 profesoroj kaj kelkaj posedantoj de Supera A. pri Lernado), S-ro Jouquait proponas organizi specialajn kunvenojn kaj krei « Cercle d'études esperantistes », kie oni laboros alternivele pri tradukaĵoj, poezioj, k. t. p.

La Komitato de la grupo decidis ankaŭ inviti ĉiumonate preleganton, alilandanon aŭ eksterurbanon.

**ARTEZA DISTRIKTO.** — Okaze de la komencigo de Cseh-metoda kurso en Lens, la 10<sup>o</sup> de novembro 1936, la estroj de la grupoj en Lens, Liévin, Arras akceptis starigi Artezan Distrikton. Oni decidis aranĝi ĉiumonate kunvenon por komuna laborado. La grupoj de Béthune, Marcœuil kaj Izouloj estas invitataj. La unua kunveno okazos en Lens, dum januaro.

**AVESNES-SUR-HELPE.** — La konferenco qu'on donné M. Jean Couleaux a réuni dans le Grand Salon de la Mairie d'Avesnes une assistance des plus choisies et beaucoup plus nombreuse que ne l'aurait laissé supposer le mauvais temps.

M. Blavel, maire d'Avesnes, avait tenu à venir présider lui-même cette séance de rentrée.

Très applaudi, le conférencier, M. Jean Couleaux, en terminant, annonça que le Cours d'Espéranto commencera à la Mairie d'Avesnes le Jeudi 19 Novembre, à 20 heures.

Ce cours, public et gratuit, sera professé de telle manière qu'intellectuels et ouvriers auxquels le Groupe fait un pressant appel, pourront le suivre avec un égal profit.

**BOULOGNE-SUR-MER.** — La komitatoj de nia grupo kunvenis por elekti sian oficistaron. Jen ĝia konsisto: Prezidanto, S-ro A. Le Petit; Viceprezidantoj, S-ino Sagnier kaj S-ro Baire; Sekretariino, F-ino Delattre; Helpsekretario, S-ro Jak Demelin; Kasisto, S-ro Allart; helpkasisto, S-ro Kert; Bibliotekisto, S-ro Duchochois; Membroj, S-inoj Bayeux, Horel, Vicart, Baire, Quarré, S-roj Favre kaj Obez.

Post la elektado oni preparolis la programon de nia vintra propagando kiu komenciĝos per la aranĝo de publika prelego de S-ro P. Obez pri la vivo kaj verko de D-ro Zamenhof. Tra la tuta urbo estis disdonitaj 3000 invitiloj al la prelego, kiu okazis la 5<sup>o</sup> de novembro en la vasta salono de la komerca ĉambro.

Bedaŭrindege, aĉa vetero kaj la malproksimeco de la prelegejo malebligis multajn personojn ĉeesti. Sed, trankviliĝu karaj gelnantoj; spite tiuj malhelpaĵoj la prelego plene sukcesis.

S-ro Le Petit, nia prezidanto, prezentis al la ĉeestantaro la simpatian kaj junan preleganton, S-ron Obez, kiu tuj per subtila stilo preparolis la admirigindan personecon de la aŭtoro de esperanto. En la dua parto S-ro Obez faris prolecionon laŭ rekta metodo. Viglaj respondoj videbligis ke la publiko estas interesata kaj amuzata. Reaplaŭdado rekompensis meritplenan kaj sindonan preleganton.

Listo de la laŭreatoj de « Atesto pri Lernado »: F-inoj Jeanne Herman, Gisèle Deroire, Isabelle Bouffart, Ghislaine Rucet, Lilliane Cuxac, Odette Durieux, S-roj René Alleurart, Marius Favre, Charles Hoyer, J. Monborgne. Krom tiuj gelnantoj la ceteraj ankaŭ ricevis premiojn donacitajn de F-ino Pannevin kaj S-roj Sergeant, Michaux, Duchochois. La rekompencitoj estas S-roj Raison, Norreal, Grimbart, Mazurier, Loisel, De Sainte-Mareville, Poullin, Tessier, Milon, Vandieck.

La grupo aranĝos kursojn tuj kiam ejo estos je ĝia dispono.

**CALAIS.** — La première leçon du cours élémentaire a eu lieu dimanche le 8 Novembre, au Siège de l'« Activité Intellectuelle du Calaisais » 4, Boulevard Lafayette. Ce cours

CALAIS (suite).

faît par une méthode attrayante et amusante aura lieu dorénavant chaque dimanche à 11 heures, salle Aristide Briand.

La première leçon d'Espéranto supérieur et commercial, a eu lieu le lundi 16 novembre, à 20 heures, dans la même salle.

Espéranto et les Instituteurs. — L'assemblée générale du groupe du Nord des Amis de l'École Nouvelle, dont le secrétaire est notre dévoué samideano M. Paul Hulín, instituteur à Phalempin, et qui compte parmi ses membres de nombreux esperantistes, a émis le voeu que l'enseignement de l'Espéranto soit introduit dans les programmes scolaires; en raison surtout: 1° de son éminente valeur éducative; 2° de la contribution certaine qu'il peut apporter à la paix entre les peuples.

**CAUDRY.** — A la demande de la Section Espérantiste « Espéranto kaj Paco » du groupement d'action pour la Paix, l'Association amicale des anciens Elèves des Ecoles laïques de Caudry et le Congrès des œuvres Post-scolaires de l'arrondissement de Cambrai ont émis un voeu en faveur de l'introduction de l'Espéranto dans les écoles.

— Le Groupe Espérantiste « Verda Stelo » prépare pour le 6 décembre un grand bal de Saint-Nicolas. Les membres de ce groupe se donnent entièrement à cette besogne et, si le succès couronne leurs efforts, ils envisageront l'organisation de conférences esperantistes.

**DESVRES.** — Des articles de propagande paraissent chaque semaine dans le journal local « L'Echo du Mont Hulín ».

Une exposition a été installée avec le matériel de la SFPE dans une vitrine de la ville, du 20 octobre au 4 novembre.

M. Deligny, de Saint-Omer, est venu faire une conférence en français à la Salle des Fêtes de la Mairie. Des projections lumineuses ont été faites. Une centaine d'assistants.

Deux cours sont ouverts à la Mairie depuis le 18 novembre, chaque mercredi, de 20 à 21 heures:

a) pour débutants avec 40 élèves; cours dirigé par Mme Paquentin, secrétaire.

b) pour aŭrigantoj avec 20 élèves; cours dirigé par M. Dumarque, président.

**DOUAI.** — Deux cours ont commencé récemment. Le premier a lieu les mercredis, à 20 h. 30, 5, rue Fortier. Le second, fréquenté par 55 élèves de l'École Pratique Idm. Labbé a lieu les vendredis, à 18 h. 30.

— Nia samideano Jean Deslandre, eks-sekretario de Fourmies-a grupo, kiu nun estas en la soldatejo Caux, en Douai, intencas propagandi nian karan lingvon kaj eĉ gvidi kurson en la kazerno, se li sukcesos ricevi permeson de siaj estroj.

**DUNKERQUE.** — Sesdek entuziasmaj novaj gelnantoj vizitas regulu kurson gvidatan de F-ino Germaine Spyns, kiu okazas ĉiujarde en la urbodomo. Tridek partoprenas la tre interesan perfektigan

kurson gvidatan de S-ro Nogé ĉiuvendrede, kaj deko de fervoruloj la konversaciojn ĉiumarde, je la 18<sup>o</sup> 30.

La 1<sup>o</sup> de decembro okazis parolado de F-ino G. Hansen, pri Danlando.

Ĉiusabate interbabiladoj en Café du Centre. Ĉiudimanche aperas E.-kroniko en loka tagĵurnalo Le Nord Maritime. Jam ĉirkaŭ 200 kronikoj aperis.

La Urbestaro voĉdonis deziresprimon pri la enkonduko de Esp. en ĉiujn lernejojn.

— VIDU LASTHOE...

**FRESNES.** — Le 11 novembre, jour anniversaire de la commémoration de l'armistice, fut une bonne journée de propagande. Le groupe, avec bannière, assista d'abord à la messe avec les autres sociétés. Ensuite il participa au défilé et à l'hommage aux morts. A la réception qui suivit ces cérémonies, M. Defer, le dévoué président des A. C., fit l'éloge de notre groupement naissant et magnifia en termes éloquents l'œuvre du docteur Zamenhof au point de vue pacifique. Ensuite M. Beauvois, maire de Fresnes, au cours d'une belle improvisation, invita tous les assistants à suivre les cours d'Espéranto car, dit-il « lorsque tous les peuples se comprendront, ce sera la fin des guerres ».

— A noter que sous la direction de M. Centnersver (de Valenciennes), nos cours sont très suivis et très appréciés. — E. N.

**JEUMONT-MARPENT.** — F-ino Simone Bretelle, 18, rue Victor-Hugo en Jeumont gvidas kurson en tiu urbo. 29 gelnantoj.

**LENS.** — Mardi soir, le 3 novembre, M. Centnersver a fait une intéressante causerie devant une cinquantaine d'esperantistes sur la vie et l'œuvre du Docteur Zamenhof. En même temps une belle exposition des revues, tracts, journaux et livres fut présentée aux auditeurs. M. Max a remercié vivement le conférencier au nom du comité. A la fin M. Karl, esperantiste hongrois, a exprimé la solidarité que crée la langue commune entre les esperantistes de tous les pays.

L'ouverture du cours pour les débutants dirigé par M. Stuit a eu lieu le 10 novembre dans la Salle de la Justice de Paix devant un public nombreux. M. Locqueneux, inspecteur primaire, présidait cette réunion. M. Paul Sion, député du Pas-de-Calais, était présent.

M. Brunet, présenté par M. Combereq, a fait une courte causerie, en français, sur l'Espéranto. Ensuite, M. Stuit a fait une leçon de démonstration de la méthode Cseh.

La réunion se termina par une allocution de M. Locqueneux qui nous a exprimé son contentement d'avoir assisté à cette leçon, et combien il a été frappé par la manière que la méthode emploie pour instruire sans fatigue.

Un compte-rendu très intéressant, rédigé par un journaliste non esperantiste qui a assisté à la réunion, a paru dans Le Journal de Lens sous le titre « Une soirée chez les Esperantistes ».

Le cours a lieu tous les samedis à 19 h. 30 à l'École Barnot, à partir du 14 novembre,

## LENS (suite).

— Jam la duan fojon nia grupo ricevas 200 frankan subvencion de la nekonata samideano S-ro Nemo Pierre, el Avion.

Ni esprimas al tiu malavara amiko niajn plejvarmajn dankojn.

Grupa akso  
estas MAX  
Esperantista tajloro  
pli valoros ol oro. (J. C.)

**LIÉVIN.** — Du kursoj okazas en tiu urbo : ĉiu lunde sub gvidado de S-ro Ponchart, kaj ĉiujlaŭde de S-ro Viseux ; ĉiu el ili kolektis ĉirkaŭ 15 gelnantojn.

**LILLE.** — Les cours et causeries du samedi soir au Foyer Lillois, 24, rue Gauthier de Châtillon sont suivis par des élèves qui, s'ils ne sont pas très nombreux, sont fervents et assidus. D'autre part, le cours ouvert le jeudi soir par M. G. Waringhien, est fréquenté par une vingtaine d'élèves qui sont au point de départ d'une ascension difficile, mais qui, sous une direction aussi autorisée, ne manqueront ni d'émulation, ni d'ardeur. Le sommet à atteindre n'est rien moins que la « Atesto pri kapableco ». Il est ravissant et s'il reste inaccessible à une partie d'ascensionnistes, peut-être se trouvera-t-il sur la pente le souriant « Supera Atesto ». Et si même le chemin devait être avare de ses lauriers, personne ne sera privé du fruit précieux d'un enseignement vraiment supérieur. — M.V.

**LOOS.** — Mardon la 24<sup>o</sup> de novembro, S-ro Contart, lernejestro, komencis kurson kaj klopodas por starigi grupon en sia urbo.

**MALO-LES-BAINS.** — Pli ol 20 plenkajuloj regule vizitas la kurson por komencantoj kiu okazas ĉiuvendrede en Bibliothèque Municipale, rue Clémenceau. La urbestro voĉdonis deziron pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

**PONT-SUR-SAMBRE.** — Merkrede la 14<sup>o</sup> de oktobro okazis malfermo de nova kurso por komencantoj en la knaba lernejo. Tiu kurso okazas ĉiutage kaj estas gvidata rektmetode de S-ro Broutin, prezidanto, kaj gramatikmetode de S-ro Buronfosse sekretario de la grupo. 25 gelnantoj vizitas ĝin regule.

**SAINT-OMER.** — La kursoj baldaŭ rekomenĉigos en la urba grupo kaj en la liceo. — Oni preparas Zamenhof-memorigan feston por la 15<sup>o</sup> de decembro.

— S-ro Delcourt sukcesis la ekzamenon por « Atesto pri Kapableco ». Gratulojn.

**SAINT-POL-SUR-MER.** — Dufoje ĉiusemajne laŭde kaj sabato okazas kurso gvidata de S-ro Lasuye, en la « Cité » laŭ la bonega « Cours Pratique » Partoprenas ĝin 20 gelnantoj, parte komencantoj kaj parte lernintoj de la Cseh-kurso de la pasinta jaro.

**VALENCIENNES.** — Vendrede la 13<sup>o</sup> de novembro okazis je la 19<sup>o</sup> en « Café de l'Europe », sidejo de la Esperantista Grupo, kunveno de la regionaj esperantistoj, dum kiu S-roj Guillaume kaj Naoumoff parolis en Esperanto. Prezidis la kunvenon kaj prezentis la prelegantojn F-ino Barret, prezidantino de la Valenciennes-a Esperantista Grupo. S-ro Guillaume paroladis pri la nuna stato de nia movado kaj pri la arango de Internacia Konferenco por la Enkonduko de Esperanto en la Teknikon, dum la Pariza Ekspozicio en 1937 ; kaj S-ro Naoumoff pri la renaskiĝo de Valenciennes-a Esperantista Grupo, post la milito kaj pri siaj rememoroj koncerne la arango de la Federacia Kongreso en 1929, en Valenciennes, 40 ĉeestantoj per varmaj aplaŭdoj esprimis sian kontentecon kaj dankemon pro la interesaj prelegoj.

**WALLERS.** — Un cours pour les débutants, dirigé par M. Centnersver, a commencé le 4 novembre, et a lieu tous les jeudis de 18 h. 30 à 20 h., à la Mairie. 24 personnes le fréquentent assidûment.

★

## IZOLULOJ

Sekve de nia alvoko en la antaŭa numero de N.E.E., 3 personoj respondis. Tio ne estas sufiĉe. Ni esperas ke aliaj sendos leteron al S-ro Brunet, 7, rue Saint-Michel, Arras.

Li tre deziras rilatiĝi kun esperantistoj loĝantaj en Cambrai, por krei tie Esperanto-Grupon kaj kurson.

Ankaŭ la izoluloj en Hesdin, Saint-Venant, Don, kaj aliaj estas ĝentile petataj informi lin pri la nuna stato de nia movado en tiuj lokoj. En la lasta momento ni ekscias ke ankoraŭ 4 izoluloj respondis al la alvokletero de S-ro Brunet.

★

## GAZETARA SERVO

(adreso : Esperanto Dunkerque)

Dum novembro aperis 4 artikoloj senditaj al tagjurnaloj kaj informoj pri radio en 4 jurnaloj.

Regule publikigas esperantistan kronikon : *Le Nord Maritime*, *Le Courrier d'Avesnes*, *Le Bonhomme de Douai*, *Le Phare de Calais*, *Le Journal de Lens*, *Le Progrès de la Somme*. Eble ankaŭ aliaj gazetoj, sed ni ne ricevis ilin.

## LIBROJ

■ Estas aĉeteblaj ĉe la ĝenerala sekretario : *Histoire de la Fédération du Nord*, prezo 3 fr. ; *Conseils aux Groupes Espérantistes*, prezo 4 fr. ; *Gvidlibro por Superaĵ Ekzamenoj*, prezo 4 fr. 75. Ĉiuj prezoj entenas la sendafrankon.



# En nia Federacio

Prezidanto : S-ro Albéric HUMEZ, 13 ter, rue Morel, à Douai  
Sekretario : Jak. CENTNERSVER, 9, rue Ferrand, à Valenciennes

## Kunveno de la Federacia Komitato

la 6<sup>o</sup> de decembro 1936

Ĝi okazos je la 10<sup>o</sup> kaj duono akurate en « Salle du Denier des Ecoles », 5, rue Fortier, (kontraŭ la muzeo) en Douai. Nur la federaciuloj, kiuj pagis sian kolizon por 1936 rajtas partopreni tiun kunvenon.

Je la 12<sup>o</sup> : vizito de la Muzeo, kiu estas tre interesa kaj enhavas ĉiuspacajn altvalorajn, sub la gvidado de S-ro D-ro Paul Desmoulin, prezidanto de Douai-a Esperantista Grupo kaj Naturscienca Sekcio de la Muzeo.

Je la 13<sup>o</sup> : opa tagmanĝo en aparta salono en la « Hôtel du Grand Cerf », 20, rue Saint-Jacques. La prezo estas 20 frk. Trink-aĵo kaj mono entenataj. La tagmanĝontoj estas petataj nepre avizi antaŭ la 3<sup>o</sup> de decembro — lasta templimo — S-ron Humez, 13 ter, rue Morel, Douai. Ne necesas sendi monon antaŭe.

Ni kore invitas ĉiujn gefederaciulojn ĉeesti tiun kunvenon.

La prezidanto : Albéric Humez.

La sekretario : J. Centnersver.

★

## Inderso de la Komitato Kunveno

1. Legado de la korespondajloj ;
2. Transdono de la pokalo « Fervorigilo » de la grupo de Douai al la grupo de Pont-sur-Sambre, kiu gajnis ĝin dum la Federacia Kongreso en Haumont ;
3. Mallonga raporto pri la funkciado de ĉiuj servoj de nia federacio.

**IZOLULOJ.** — S-ro Brunet sendas ĉiunmone raporton pri sia agado ĉe izoluloj en departementoj Pas-de-Calais kaj Somme. Bedaŭrinde ni ne havas raporton pri izoluloj en Nordo.

**RADIO-SERVO.** — S-ro Nogé alsendis eksigpeton. S-ro Alglave ĝis nun helpdelegito por tiu servo povas fariĝi delegito.

**BIBLIOTEKO.** — La nombro de la libroj estas tre malgranda. S-ro Alglave, eksbibliotekisto transdonis la tutan materialon al S-ro Cent, kiu opinias ke estas plibone ke tiu materialo restu ĉe li pro jenaj motivoj : a) li aldonis sian materialon al tiu de la federacio kaj tiamaniere pliriĉigis la katalogon ; b) estante en konstanta kontakto kun grupoj kaj izoluloj, li havas okazon instigi esperantistojn al la legado ; c) vizitante de

tempo al tempo diversajn grupojn li kunprenas librojn kaj ekspozician materialon por montri ilin al la publiko.

**EKSPOZICIO.** — Parto de ĝia materialo troviĝas ĉe S-ro Cent. La alia en Lille. Ni ne ricevis raporton pri la stato de la servo.

**GAZETARA SERVO.** — Ni ricevas ĉiunmone raporton de S-ro Houzé, kiun ni publikigas en N.E.E.

**PRELEGANTOJ.** — Ĉiuj postuloj de la grupoj estis plenumitaj. Ni starigis programon de prelegvojaĝo de F-ino Hansen ; bedaŭrinde multaj grupoj rifuzis aŭ prokrastis la inviton. Same koncerne la prelegvojaĝo de S-ro Cent.

**PROPAGANDO ĈE LA INSTRUISTARO.** Tiu servo estas miksitita kun la « Groupement Espérantiste de l'Enseignement ». Gvidas : S-ro Marcand, Pont-de-la-Deule (Nord).

4. Rezultatoj de la Dusemajna Propagando de S.F.P.E. en grupoj kaj ĉe izoluloj.

5. Diversaj demandoj.

La komitatanoj kaj grupestroj kiuj ne povas ĉeesti la kunvenon estas petataj sendi riprezentanton aŭ konigi perletere siajn opiniojn kaj sugestiojn al la ĝenerala sekretario, 9, rue Ferrand, Valenciennes (Nord).

★

## KIU GRUPO DEZIRAS ARANĜI CSEH-KURSON ?

Dana Cseh-profesorino, F-ino Gertrud Hansen gvidas nun Cseh-metodan kurson en Anzin kaj Saint-Saulve.

Ŝi estas libera komence de decembro kaj volonte akceptos gvidi kurson en grupoj kiuj sin turnos al ŝi kun tiu propono.

La kondiĉoj estas tre favoraj, ĉar F-ino Hansen postulas nur se la grupo estas vere malriĉa — la repago de la restad — kaj vojaĝelspezoj.

Bonvolu skribi al ŝi pri tiu afero.

Adreso :

F-ino G. HANSEN, Café-Restaurant Robert, rue de Lille, VALENCIENNES (Nord).

## Nordfranca Esperantisto

por vivi bezonas vian helpon

ABONU ĜIN

ABONIGU VIAJN AMIKOJN

05<sup>o</sup> VARBU MULTAJN ABONANTOJN !

CIAM PORTU LA VERDAN STELON



Se vi estas vera esperantisto, havu almenaŭ eksterlandan korespondanton por plivastigi la internaciajn rilatojn.

# STENOGRAFIO

## Kio estas Stenografio ?

Ĉar en tiu studo ni intencas konsideri la stenografan demandon en multnombraj detaloj, eble oni konsentos kun mi, ke decas komenci pri la afero mem, kaj demandi : kio ĝi estas ?

Pri tio ĉiuj stenografistoj ne interkonsentas. Kelkaj diras : stenografio estas scienco ; aliaj respondas : ĝi estas arto ; tria grupo certigas ke ĝi estas nek scienco, nek arto, sed simpla okaza rimedo.

Ĉiuj kolegoj kiuj volas per unu vorto enklasiĝi la stenografion, pli malpli eraras. Multe pli pravaj estas tiuj, kiuj nomas ĝin : arto-scienco, ĉar mi kredas ke ĝi estas samtempe arto kaj scienco. Eĉ oni povas konsenti ke ĝi ne estas okaza rimedo, sed, simple rimedo. Tio dependas de kia vidpunkto oni ĝin konsideras.

Ni komparu la stenografion kun la ordinara skribo, kaj, eble, ni sukcesos klarigi la aferon.

Se, en la kutima skribo, ni konsideras la literojn, tio estas la signaro, kiu ebligas fiksi nian penson, ni ne povas diri ke tiu signaro estas scienco aŭ arto : ĝi estas simpla rimedo. Samgrade la stenografita signaro estas nur rimedo. Se ĝi ne estas okaza rimedo tio estas ĉar ĝi neniam ŝanĝas por kiu kutimas uzi ĝin aŭ alian sistemon... krom profesiaj esceptoj.

Kiam en la kutima skribo, ni konsideras la studon de la diversaj skribmanieroj, ilian komparon, la ekzamenon de iliaj kvalitoj aŭ malbonaĵoj, kiam oni serĉas pri iliaj devenoj, iliaj evolucioj kaj sinsekvaj uzoj, kiam oni penas por ilin pli-perfektigi, la skribo fariĝas vera scienco. En samaj okazoj oni povas diri, ke la stenografio estas scienco.

Kiam en la kutima skribo, ni konsideras la belecon de la desegnitaj signoj, la lertecon de la skribisto, kies plumo flue kuras sur la papero, la spertecon de la redaktanto, kiu kapablas verki en pura lingvo, rakontojn, poemojn, paroladojn, kiuj amuzos, emocios aŭ instruos nin, la skribo, nedubinde, fariĝas vera arto. Samokaze kaj samgrade ni povas certigi ke stenografio nepre estas arto.

Kompreneble estus ridinde diri ke stenografio estas art-scienc-rimedo. Ĉiu vorto izola estas vera sed nesufiĉa. Ni do, ne riproĉu se ĉi diras, ke stenografio estas

scienco dum alia klarigas, ke ĝi estas arto aŭ rimedo : ĉiuj diras veron, nur ili ne diras la tutan veron.

Sed, ĉu vi nepre bezonas pli precizan enklasiĝon ?

Eble ni povas pli facile interkonsenti por difini la celon de la stenografio.

Kiam en vortaro ni serĉas la signifon de tiu vorto, ni kutime trovas tian klarigon : arto skribi tiel rapide, kiel oni parolas. Pli prave la vortaroj devus diri : kiel parolas oratoro.

Ĉu do la multnombraj personoj, kiuj pli malpli lerte uzas tian rapidan skribon, ne estas konsiderindaj kiel stenografistoj, ĉar ili ne kapablas kapti paroladon ?

Certe oni ne povas nomi stenografiston tiun, kiu ne povas — eĉ per stenografita sistemo — skribi pli rapide ol per la ordinara skribrimedo. Sed la multnombraj personoj, kiuj atingas sufiĉan lertecon por, ekzemple, skribi diktitan leteraron, aŭ pli simple, por noti siajn pensojn almenaŭ duoble pli rapide ol per kutima skribo, estas nedisputeble, stenografistoj.

Tamen, laŭ mi, tia rapideco ne sufiĉas per si mem. Kiu atingas saman rapidecon per simpligita ordinara skribo estas nur brakigrafisto, ĉar tia sistemo ne ebligas, eĉ al spertuloj, sekvi rapidan paroladon de oratoro. Povas esti stenografisto — eĉ nelerta stenografisto — nur tiu, kiu uzas stenografion.

Kiel do difini tiun vorton ?

Jen klarigo, kiun mi proponas :

**STENOGRAFIO** : sistemo de konvenciaj signoj, kiu, dank'al ilia mallongeco, ebligas skribi pli rapide ol per la kutima skribmaniero, kaj donas la eblecon sekvi la plej rapidparolemajn oratorojn.

**P. FLAGEUL.**  
(daŭrigota)

## Al niaj legantoj...

Tri de niaj abonantoj alsendis al ni multajn abonilojn por siaj eksterlandaj korespondantoj. Ili pagis abonprezojn po 9 fr. anstataŭ 10 fr. laŭ la tarifo por eksterlando, ĉar ni konsentas tiun malaltigitan prezon por la dua kaj pluaj abonoj destinitaj al iliaj eksterlandaj korespondantoj.

Jen bonega iniciativo. Iliaj korespondantoj estos certe tre kontentaj kaj interŝange sendos al ili E-gazetojn de sia lando.

ĈIAM PORTU LA VERDAN STELON

# KURAGE ANTAŬEN ! (1)

Novembro ! Furioza vento forpelas sur la monto, dikajn, grizajn nubojn. La pluvo fortas batas la fenestrajn vitrojn de mia ĉambro kaj la akvo kiu konstante fluegas, lavas la tegmentojn. La ekblovego malindulgege atakas la lastajn foliojn kiuj kvazaŭ frenez-igas ĉe la ekstremaĵoj de la branĉoj. Mal-ŝelkaj folietoj ! Kial batali ankoraŭ ? Unu post la alia ili partoprenas la lastan valson kaj eluzitaj venas fali por ĉiam.

★

Mia fajro zumeĝas kaj de tempo al tempo ĉi karbardaĵoj kraketadas en la fajrujo. Ĝi venas vesperigis ! Mi ne plu vidas la liniojn de mia paperfolio... kaj mi ne havas la kurageon eklumigi la ĉambron...

La melankolio de tiu pluvema aŭtuno premas mian koron kaj mi cedas al la revado.

★

La kamp' estas larĝa kaj rekta la vojo... Antaŭen sen halto kaj timo !

La regula frapetado de mia malnova horloĝo mirinde ritmas tiujn du versojn de « La homa vojo... » kaj mi ilin ripetax sen-komencie...

Nun la nokto plenigas la ĉambron, sola, tuma disketo dancas sur la plafono kaj magie allogas mian rigardon.

Ekstere la Stormo furiozas... Ne gravas ! La malgranda lumo dancas ĉiam.

Ĉu ĝi ne estas simbolo ?

★

Frazo trovita hazarde en unu el la lastaj gazetoj kiujn mi legis, revenas en mia spirito. Ĝi komenciĝas per tiuj vortoj :

Nia olivarba branĉeto aperas el... Vi scias la ceteraĵojn ! Mi ne bezonas kompletigi tiun formulon, ĉu ne ?

Kaj mi pensas : Ĉu la homo estos ĉiam lupu por la homo ?

Nia olivarba branĉeto, al ni, esperantistoj, aperas el mirinda da steloj kaj niaj koroj rifuzas vidi sur la alia flanko de rivero aŭ demontaro mordemajn hundojn aŭ minacajn tigrojn. Ĉie estas bonuloj ! Kiel facila estas kredigi al du estuloj kiuj ne povas interkomprenigi ke ili estas malamikoj ! Kiel senpene estas eksciti en ili sentojn pri dubo maltrankvilegeco kaj fine malamo !

Esperanto rapidege rompas la deformigantan spegulon en kiu atente rigardadas sinreciproke la homojn de diversaj nacioj.

homo, alia homo...  
patrino, alia patrino...  
edzino, alia edzino. . .

kaj unuj similaj al la aliaj, tra la epokoj kaj en ĉiuj landoj, ekvidas, dank'al la helplingvo ke ili vivas la saman vivon, ke ili spertas la samajn sentojn, ke ili celas la saman idealon, unuvorte ke ili estas fratoj...

Ha! la bela emocio kiun ni eksentis en Salzburg dum la vespero de nia alveno, kiam nia nova amiko Franz, feliĉega konversaciilo por la unua fojo en sia vivo kun alilandaj samideanoj, akompanis nin tra la urbo. Dolĉajn larmojn ni ŝtelrapide viŝis la morgaŭan vesperon, dum la ĝoj-plena festo, kiam Franz donacis al mia amikino kaj al mi malgrandan memoraron faritan de siaj manoj, de siaj bonaj dikaj manoj de malnova, laborema metiisto : du etajn kvarangulajn florpotetojn faritajn el arĥŝelo, garnitajn per musko kaj edelvejsoj, ornamitajn per orumitaj junketoj ! La plej riĉa donaco de la mondo ne sukcesus kaŭzi en niaj koroj la feliĉon kiun havigis al ni tiu modesta objekto, tiun vesperon, la 6<sup>da</sup> de aŭgusto 1936, en Salzburg.

« La maniero donaci pli valoras ol kion oni donacas », diras proverbo. Jen estas, karaj gesamideanoj, la vera homa frateco, la vera internacia amikeco en kiu la koroj samigiĝas ideale laŭ la nobla revo de nia Majstro, Doktoro L. L. Zamenhof. Al ni, Esperantistoj de la tuta mondo, la tasko vekigi tiujn sentojn kiuj dormas ĉe ĉiu homa animo.

★

Esperanto ! ĉarma princo, verde vestita, venu, venu al la belulino kiu vin atendas de tiel longe ! La malbona feino estos senpotenca kiam vi prenos la manon de la dolĉa princo kiu revivigos via amema gesto !

Amikoj, ni rigardu la mondon frunten ; la homaro ne estas tiel malbona kiel vi kredas, sed danĝeraj fortoj ĝin senkapablighas kiam ĝi volas plialtigi. Por liberigi tiun malliberulinon, estas necese ke ni kunigu ĉiujn niajn volojn, ĉiujn niajn trezorojn de boneco, de pacienco, de amo.

Ni estu ŝanĝigitaj por esti fortaj ! Mi vin petegas, ne uzu Esperanton kiel propagandilon por imponi al la aliaj vian vidmanieron, viajn personajn opiniojn aŭ eĉ por ilin diskutadi. Atentu bone, vi malpacighas la homojn anstataŭ ilin konkordigi, vi detruus la konstruaĵon tiel pene komencitan, vi estus la propra malamikoj de nia nobla idealo. Ĉu estas tio kion deziris Zamenhof ?... Ni komprenu la signifon de lia vivo, vivo de laboro, vivo de boneco, vivo de sinifero ! Ni marŝu sur iliaj paŝsignoj sur tiu « rekta vojo » kie, sola, la boneco devas nin gvidi tiu « persistega boneco kiu venkas la plej malbonajn korojn ».

Super la kutimaj kvereloj, ni levu niajn korojn, Esperantistoj, niaj amikoj : Esperanto estas samtempe lingvo kaj doktrino, paca lingvo, ama doktrino. Oni ne rajtas disigi unu de la alia ; kiu ajn servigas la lingvon kaj forĵetas la doktrinon ne estas esperantisto laŭ la vera senco de la vorto.

Do, kurage ni laboru, por la paco per Esperanto.

« La kamp' estas larĝa kaj rekta la vojo Antaŭen sen halto kaj timo ! »

Via fidela

FLANDRA ANTIKVAJO.

(1) Por progresemluloj.



## Redakcia Leterkesto

Car mi ne havas la eblon pro manko da tempo respondi al ĉiu el niaj afablaj korespondantoj, kiuj pelis de ni sciigojn, ni respondas al ili ĉi-tie.

*S-ro P. B., en Wallers.* — Jes, ni akceptas la abonon al Franca Esperantisto. Ni eĉ incitas niajn samid. lion fari. Ni skribos.

*S-ro Depont, en Q.* — Ni notis vian abonon. Vi ricevos Nf.E. anstataŭ Antaŭen.

*S-ro de Lajarte.* — Plej koran dankon.

*S-ro Ch. Darras.* — Dankon. En Suresnes estas esperantistoj. Klopodu ilin renkonti.

*Al multaj* — Tŭtkoran dankon pro abonoj, kuraĝigaj vortoj, gratuloj kaj promesoj de kunlaborado.

## Letero

Cher Monsieur

Que je vous félicite d'abord pour la publication de ce beau bulletin de Nordfranca Esperantisto que je reçois ce matin. Je sais mieux que personne tout le travail et toute l'ingéniosité que représente une édition comme celle-là et la Fédération du Nord a droit de ce chef à tous nos éloges.

Mais ce n'est pas sans un étonnement douloureux que j'ai lu votre article : BRAVO LES LYONNAIS ! J'aime beaucoup nos amis de Lyon qui sont très actifs et font d'excellente besogne. Ils n'appartiennent pas à la SFPE et ont droit de prendre toutes les initiatives qui leur paraissent opportunes, même si, le cas échéant, elles venaient contre-carrer les nôtres.

Mais vous dites : « Nous aurions certes préféré voir prendre cette belle initiative par la SFPE... Nera-t-il donc toujours dû que l'initiative privée doive sans cesse suppléer à la carence des organisations officielles ? »

Comment est-il possible de parler, dans l'organe officiel de la Fédération du Nord, qui sait parfaitement les initiatives innombrables que nous ne cessons de prendre ici, de la « carence » de la SFPE. Et comment justifier une attaque aussi violente et aussi inattendue contre nous ?

Qui pourrait dire en France, en effet, qu'il ignore le travail considérable réalisé au cours de ces dernières années par la SFPE en matière de propagande générale ? Qui ignore les ressources qu'elle a dû réunir (50 à 60.000 fr. par an) pour effectuer ce travail, alors que l'ensemble des cotisations annuelles reçues (5 à 6.000 francs) aurait à peine permis à son bureau de vivre ?

Cette propagande, nous la poursuivons suivant un plan parfaitement défini et une dizaine de nos amis, à la tête desquels se

trouve notre infatigable secrétaire permanent, M. Petit, y consacrent une activité dont le moins qu'on puisse dire, c'est qu'elle commande le respect.

Vous n'hésitez cependant pas à parler de carence ! - Je n'hésite pas à vous dire que si vous connaissiez quelqu'un qui puisse faire au bureau central de la SFPE, mieux que ce qui y est fait aujourd'hui, nous nous empresserions de lui remettre les leviers de commande et de prendre un peu de ce repos auquel, pour ma part, j'aspire depuis plus de trente-deux ans que je suis au service du mouvement espérantiste.

N'oubliez pas, par ailleurs, que c'est nous qui avons créé le groupe espérantiste parlementaire, qui avons documenté depuis quatre ans chacun des députés et sénateurs par des lettres de toute nature et un dossier qui comprenait en particulier une brochure spécialement éditée pour le Parlement. Mais vous devez savoir que les parlementaires reçoivent trop de circulaires pour faire un sort spécial à celles qui concernent l'espéranto, et nous sommes payés pour savoir que si le groupe de la Chambre a réuni, en 1936, 90 membres, nous le devons uniquement à l'action personnelle exercée auprès d'eux tant par nous directement que par les membres et dirigeants des groupes locaux.

Vous écrivez que l'action à exercer sur les parlementaires « aurait pu l'être au besoin par les groupes locaux ». Mais vous oubliez que notre dernière circulaire aux groupes datée du 20 septembre (page 3, sous le titre « Groupe parlementaire ») demande précisément à ces groupes « de rappeler aux élus les promesses qu'ils ont pu faire pendant la campagne électorale, et de leur demander de faire parvenir, par l'intermédiaire de la Questure, leur adhésion au groupe parlementaire ».

Ce que vous demandez, c'est donc justement ce que nous avons fait. Quant à envoyer en ce moment de nouvelles circulaires aux parlementaires, nous savons trop quel en serait le résultat ! Nous réalisons depuis deux mois un tout autre programme qui sera, selon nous, autrement efficace.

Et ce sera aux groupes et aux fédérations de nous aider et de réaliser une propagande régionale et locale aussi persévérante que celle que la SFPE réalise nationalement.

Je m'empresse de dire que si toutes les fédérations faisaient à cet égard leur devoir comme le fait la fédération du Nord, notre travail auprès des Pouvoirs publics serait singulièrement facilité !

Je vous serais reconnaissant de vouloir bien insérer cette réponse dans le prochain numéro de Nordfranca Esperantisto et de croire, cher Monsieur, à mes sentiments les meilleurs.

Jean COUTEAUX,  
Secrétaire général de la SFPE.

## ... kaj Respondo

## Netolerebla Skandalo !

# Oni atakas nian Direktoron !

Lequ la terurajn detalojn  
en nia 99<sup>a</sup> eldono !



La parizaj sanktuloj :

— Se vi ne solene promesas al ni ne plu verki malagrablajojn rilate al ni. tuj ni tranĉos al vi la kapon !

La direktoro, terurigata :

— Ho ! SANKTA TRANĈILO.  
SANKTA MALGRANDULO kaj  
SANKTA ĈEFDIAKONO, kiuj estas  
en Parizo, mi humile pardonpetas  
al vi, pro la malbono nevole farita  
al vi... Mi promesas, ho ! SANKTAJ  
SANKTULOJ ! ne plu fari tion...  
La venonta fojo !...

## Rédaction pour nos abonnés

Franca Esperantisto est la belle revue mensuelle officielle de la SFPE, remarquablement rédigée en français et espéranto.

Nos abonnés pourront la recevoir à demi-tarif pour 1937, à condition de se hâter, soit en nous envoyant 16 francs pour Nf.E. et F.E., soit en complétant le versement déjà fait, par virement ou mandat à VERNAY, 33, rue Marceau, à Rosendaël-les-Dunkerque (C. C. Px : Lille 40.350).

Les membres des groupes (par exemple Dunkerque, Airaines, Longpré) qui abonnent automatiquement leurs membres à Nf.E. n'ont donc qu'à nous adresser 9 francs.

Les deux revues paraissant l'une le 1<sup>er</sup> ou le 5, l'autre le 15 ou 20, seront adressées séparément dès leur parution.

## Dernière heure.

## Nouvelles diverses

De notre correspondant spécial à Paris :

M. Julien, Sous-Secrétaire d'Etat au Ministère de l'Instruction Publique, vient de déclarer au Secrétaire Général de la SFPE, qu'il autorisait les Directeurs des Etablissements de l'Enseignement Technique à organiser des Cours avec le concours de la SFPE, soit pour leurs élèves, soit pour le public.

★

Le Comité de la Conférence Espérantiste qui doit avoir lieu à Paris pendant l'Exposition Internationale, s'est réuni le 17 novembre. De hautes personnalités y assistaient, parmi lesquelles nous citerons notamment : M. Bonnet, directeur de l'Institut de Coopération Intellectuelle ; M. E. Cotton, de l'Académie des Sciences ; M. le Recteur de l'Académie de Besançon, venu spécialement ; M. Farman, l'aviateur, etc., etc...

Du bon travail a été fait. Nous tiendrons nos lecteurs au courant.

★

De notre correspondant spécial du Nord :

DUNKERQUE. — Le Samedi 19 décembre, à 20 h. 30, salle Georges, place du Théâtre, en l'honneur de l'anniversaire Zamenhof : grande fête espérantiste avec chants, concert, attractions, sketch et sauterie à grand orchestre. — Invitation cordiale à tous : Amenez vos familles et amis.

## Al niaj abonantoj.

Tiuj el niaj abonantoj, kiuj deziras ricevi fine de 1937 binditan kolekton de Nf.E. (novembro 1936 ĝis decembro 1937) kun pergamena kovrilo sur kies dorso estas presita la titolo por starigi ĝin en libro-staŭgon, estas petataj alskribigi antaŭ la 31<sup>a</sup> de decembro 1936. — Prezo de tiu kolekto : 16 frj (sendotaj aŭfranke), kun mendo al la administracio de nia bulteno.

## La lingva problemo en Norvegujo...

Ĉar kelkaj el niaj abonantoj petis de ni kelkajn klarigojn pri la lingva problemo en Norvegujo, ni publikigas la suban artikolon kiu respondos al iliaj ĉefaj demandoj kaj kiu, eble, interesos ankaŭ aliajn legantojn de nia revuo.

(La Redakcio)

★

Kiam ili alvenis en la nordajn landojn, ĉirkaŭ la 5<sup>a</sup> jarcento post Kristo, la praloĝantoj de Skandinavio estis parolantaj la saman lingvon. Sed tiu patra lingvo disiĝis en tri ĉefaj dialektoj, kiuj evoluiĝis, ĉiu en propra direkto, kiam Skandinavio estis partigita en tri landoj: Danujo, Svedujo kaj Norvegujo.

La evoluo de tiuj dialektoj estis tamen malrapida kaj oni povas ekvidi la grandan analogion kiu ekzistas inter la nunaj skandinavaj lingvoj kiam oni komparas ilian gramatikon kaj vortaron. Cetere, Danoj, Svedoj kaj Norvegoj sia interkomprenas malgraŭ la lingvaj diferencoj.

Ekde ĉirkaŭ la 9<sup>a</sup> jarcento ĝis 1536<sup>a</sup> jaro, Svedujo, Norvegujo kaj Danujo estis regataj de apartaj reĝoj. Sed je tiu lasta dato la reĝo de Norvegujo mortis kaj lia unika filino edziniĝis kun dana princo; de tiu epoko ĝis la 1814<sup>a</sup> jaro la danaj reĝoj estis samtempe reĝoj de Danlando kaj de Norvegujo. Tiuj historiaj okazintaĵoj formas la fondon de la lingva problemo en Norvegujo kaj nur pro tio, rapide ni ilin rememorigis.

Ĉar la administrantoj, la ŝtatoŝefoj, k.t.p. estis Danoj, baldaŭ la dana lingvo anstataŭis la norvegan dialekton kaj iĝis la oficiala lingvo de la lando. Dum tri jarcentoj, periodo dum kiu daŭris, preskaŭ seninterompe, la kununuigo dana-norvega, ĝi estis la literatura lingvo de la du landoj. Tamen se en la grandaj urboj kaj en la diversaj landaj administracioj oni uzis la danan lingvon, en la vilaĝoj, la loĝantoj estis ankoraŭ parolantaj la antikvan norvegan dialekton, tamen elparolintan diversmaniere laŭ la regionoj, ĉar influatan pro la evoluo de la najbaraj kaj diversaj skandinavaj dialektoj.

Post milito por sendependeco, Norvegujo sin unuigis kun Svedujo (1813-1814) kaj tiu unio daŭris ĝis 1905. Dum tiu epoko la rilatoj inter Norvegujo kaj Danujo estis pli malpli neamikaj kaj de tiu tempo naskiĝis la lingva malpaco en Norvegujo.

Ĉirkaŭ la 1850<sup>a</sup> jaro, eminentaj verkistoj de norvega modernigita dialekto komencis vastan propagandon favore la nacian lingvaĵon, kiu celis anstataŭigi la uzadon en sia lando de la literatura norvega-dana lingvo. Norvega poeto, Ivar Aasen (1813-1896)

redaktis ĝeneralan gramatikon bazitan sur la diversaj dialektoj elparolataj en la lando sed ĉefe sur tiuj de la okcidenta parto.

Per la normaligita lingvo li verkis poemojn kaj etajn teatraĵojn. La samlanda poeto A. O. Vinje (1818-1870) ankaŭ verkis pere de la populara lingvo, alnomita «landsmål» (lingvaĵo de la kamparoj). Tiuj du poetoj, kune kun aliaj gravaj naciistemoj, estas la iniciatoroj de la movado por restarigi la nacian lingvon. Ĝi okazigis multnombrajn malpacojn en Norvegujo kaj ĝi nun estis unu el la ĉefaj problemoj en la interna politiko de tiu lando.

Ni devas diri, por esti sulele komplete en iu malgranda artikolo, ke la lingvo uzita en Norvegujo dum la komuna periodo similis al la dana precipe per ortografo kaj morfologio. La elparolata lingvo ĝiam konservis norvegan karakteron. Dum la dua duono de la 19<sup>a</sup> jarcento, kaj paralele al la landsmaal-a movado estis en la lando emo por norvegiigi la literaturan lingvon dana-norvegan. Tio alformiĝo kies grandan parton ni ŝuldas al Bjoernson havis tre rapidan sukceson, tiamaniere ke nun la malsimileco estas videbla en la aspekto de la skribitaj lingvoj norvega kaj dana, same kiel ĝi jam ekzistis en la du parolataj lingvoj.

En la lastaj tempoj, la estroj de la landsmaal-a movado (aŭ nova norvega lingvo) sukcesis obteni de la registaro ke ĝi estu instruata en la lernejoj kaj uzata en la diversaj administracioj kaj aliaj oficialaj institucioj de la lando sammaniere kiel la literatura dana-norvega lingvo. Nune ekzistas do, en Norvegujo, du oficialaj lingvoj.

La parlamento proponis iun solvon al tiu malsimpla problemo: ĝi elektis komitaton enhavantan la ĉefajn reprezentantojn de la du lingvaj tendencoj kaj petis ilin studi la eblecon kunfandi la du lingvojn en unu sola enmetante en ĝi la bonojn de ĉiu lingvo. Tiu speciala komitato, post longaj kaj malfacilaj laboroj prezentis proponojn kiuj ne ricevis multajn aprobojn. Efektive, solvo de la problemo pere de la tria lingvo estas tute nefacila pro la malsimileco de la du lingvoj kaj ankaŭ pro la malbona volo de ĉiu.

Kvankam la plimulto de la loĝantaro en Norvegujo parolas la literaturan lingvon, tio estas la dana-norvegan lingvon, pro la jam akiritaj rezultatoj kaj la viclego kaj energio de la anoj de la landsmaal-a movado oni povas jam antaŭvidi ke post dudeko da jaroj tiu lingvo iĝos la sola oficiala lingvo parolata kaj skribata en Norvegujo.

C. VERNAY.

## PENSO

« Malico kaj malpaco ne ekzistas inter du saĝaj homoj; komprenema homo ne kontraŭparolas sensignifulon ».

FRANK TAYLOR, Halifax.

# Dans la Presse française

De L'ÉCHO DE LA TIMBROLOGIE:

## PHILATELIE ET ESPERANTO

L'une de nos abonnées, Mme Jayet, nous communique aimablement un journal esperantiste: « Heroldo de Esperanto » dans lequel se trouve une très intéressante étude de M. Werner Simon sur les cachets et oblitérations mécaniques pour lesquels l'esperanto a été utilisé, en particulier pour des congrès internationaux, pour la propagande esperantiste et touristique.

La liste donnée dans cet article comporte vingt-six cachets, dont le premier, qui date des 11-12 août 1912, a été utilisé à l'occasion du congrès esperantiste tenu à Krakow (Autriche).

Deux de ces oblitérations ont été employées en France: la première en août 1914, lors du dixième congrès international esperantiste. De forme ronde ce cachet porte le texte suivant: T. Paris-10<sup>e</sup> Congrès Intial Esperanto. Il est intéressant de noter qu'il n'a dû être utilisé qu'un seul jour, le 2 août, en raison de l'entrée en guerre de l'Allemagne.

La seconde, établie pour le 24<sup>e</sup> Congrès, en 1932 (30 juillet-6 août), également de forme ronde, est ainsi libellée: T. 24<sup>e</sup> Kongreso - Esperanto, Paris.

Les cachets signalés par M. Werner Simon ont également été utilisés en Suisse, Tchécoslovaquie, Finlande, Allemagne, Autriche, Belgique, Hongrie, Angleterre, Pologne, Suède, Italie, U. R. S. S., Espagne.

Mentionnons aussi deux oblitérations mécaniques employées depuis 1934 à Rio-de-Janeiro, pour la propagande touristique.

Du PROGRES DE LA SOMME:

## JE NE CROIS PAS...

Sous le titre et sous la signature de notre confrère, M. Georges Avril, « L'Éclairer de Nine » publie les lignes ci-après:

Il est très curieux de voir avec quelle facilité de grands esprits emploient dans leur argumentation les mots « je crois » ou « je ne crois pas » qui pourtant n'ont aucune valeur probative. Surtout, ajouterait Monsieur de La Palice, quand il s'agit de faits contrôlables.

C'est ainsi que, dans une page où il donne les raisons pour lesquelles il lui apparaît que le français, entre toutes les langues nationales, est qualifié pour remplir le rôle de langue internationale, l'écrivain anglais Galsworthy use de ce vain moyen de discussion.

Au début de son exposé, il a écrit ces lignes:

« Je ne crois pas » qu'une langue officielle comme l'esperanto puisse ser-

vir à autre chose qu'à fournir un moyen de communication d'ordre primitif. Ces langues inventées de toutes pièces ne se prêtent pas à une traduction littéraire ou scientifique... »

Si John Galsworthy, avant d'exécuter si allègrement l'esperanto, au lieu de se contenter de « croire » ou de « ne pas croire », s'était donné la peine d'examiner de près un manuel d'esperanto et de feuilleter un catalogue d'ouvrages en esperanto, son opinion en aurait pris une plus grande valeur: et quelle que soit la conclusion à laquelle il serait parvenu, il n'aurait pas proféré deux graves erreurs de fait. Il aurait appris, d'abord, que l'esperanto n'a pas été inventé de toutes pièces (puisqu'il tire ses mots, c'est-à-dire sa substance, des langues européennes) et, ensuite, qu'il se prête très bien à la traduction littéraire et scientifique (et même à la composition originale de telles œuvres) puisque dans son imposante bibliothèque (près de dix mille volumes) de telles traductions foisonnent. — En présence de ces faits il n'y aurait pas eu de place pour son « je ne crois pas ». — N'oublions pas que Zénon prouva le mouvement en marchant et que, devant cette démonstration, toute discussion devint inutile.

Conclusion: ne nous laissons pas oblour par les « je crois » ou « je ne crois pas » quel que soit le talent, quelle que soit la célébrité de celui qui les prononce. Demandons-lui s'il est allé voir de près la chose dont il parle et ne tenons pour acceptable son opinion que si elle est dûment motivée.

## L'Esperanto et l'Enseignement

Le Conseil municipal de Denain (Nord), dans sa dernière réunion, a décidé de donner le nom de Zamenhof (le créateur de la langue auxiliaire), à une rue de la ville, et a voté un vœu en faveur de l'introduction de l'Esperanto dans les Ecoles.


Ce vœu, déjà émis par de nombreuses collectivités, va-t-il bientôt recevoir consécration? On envisage, au Ministère de l'Éducation Nationale, d'incorporer l'enseignement officiel de l'Esperanto dans le programme des études de la scolarité primaire prolongée jusqu'à l'âge de 14 ans.

## EMISSIONS ESPERANTISTES

Pour la première fois depuis sa fondation, la très importante B.B.C. anglaise, qui dirige toutes les stations du réseau anglais, a transmis un programme esperantiste à l'occasion du Congrès esperantiste ouvrier de Manchester. Jusqu'à cette date, la B.B.C. n'avait jamais voulu employer l'esperanto.

# DISTRAJOJ

## 1. KRUCVORTENIGMO



**HORIZONTALE.** — 1. Sub la trunko; 2. Sufikso; De en; 3. Malgrandigas; Ofte en la fundo de multaj poŝoj; 4. Duono de doto; Sanktaj bildoj; 5. Pronomo; 6. Prefikso; Sankta loko (sen finaĵo); 7. Prepozicio; Malligo; 8. Duono de peti; Esperantaj grupoj bezonas multajn (sen finaĵo); 9. Vendas kaj fabrikas altvalorajn; Pli forta ol sendube.

**VERTIKALE.** — 1. Modernaj aŭtomobiloj ne plu havas ĝin; 2. Kiu agis; Veni de la ekstero (sen finaĵo); 4. Pronomo; Du literoj el piedo; 5. Nombro; Prefikso; 6. En literatura gazeto (sen finaĵo); 7. Verbo; 8. Granda randa objekto; Ekstremaj; 9. Necesaj en ĉiuj metiejoj; Tia estas « Nordfranca Esperantisto ».

## 2. PROBLEMO

Komercisto iris al foiro, li havis sur veturileto kaĝon en kiu estis kokinoj.

— Kiom kostas tiuj belaj bestoj? demandis al la vendisto la vilagano.

— Tiom! respondis la komercisto.

— Tiom! estas malkara! Vendu al mi duonon da ĉio.

— Vi estas tiel afabla ke, senpage, mi donas al vi duonon da kokino.

Li donis; la alia pagis kaj foriris.

Post kelkaj minutoj, alia persono aĉetis ankoraŭ duonon de la kokinoj restantaj en la kaĝo; la vendisto donis simile duonon da kokino, kaj foriris en la foiron. Post momento, la komercisto vendis ankoraŭ duonon da ĉiuj kokinoj, donis duonon kokinon senpage kaj alvenis en la foiron. Klientino aĉetis ankoraŭ duonon de la kokinoj; la komercisto donis ankoraŭ al ŝi duonon kokinon senpage kaj en la kaĝo ne plu estis bestoj.

ĈU VI POVAS DIRI KIOM DA KOKINOJ LA KOMERCISTO POSEDIS?

**ATENTU!** La komercisto ne mortigis kaj ne traĉis beston por doni al ĉiu kliento duonon da kokino.

★

Sendu solvojn aŭ komunikajojn pri tiuj « DISTRAJOJ » ĝis la 31<sup>a</sup> de decembro, nur al nia kunlaboranto: S-ro **DAMMEREY**, en BORBE, par Hazebrouck (Nord).

Mi ricevis multajn solvojn el la diversaj partoj de Francujo, eĉ de Eŭropo. Kelkaj partoprenantoj sendis al mi tre interesajn problemojn kiujn mi publikigos. Mi gratulas ilin kaj esperas ke multaj aliaj sekvos tiun ekzemplon.

La rezultatoj de la novembra konkurso aperos en la januara numero de N.E. tiuj de decembro en februaro, k. t. p.

## Esperanto-kalendareto por 1937

Nia amiko Delavigne, presisto de N.E., ĵus eldonis tag-foliaran kalendareton, kies plato (formato 22-13) prezentas fotografajn de nia Majstro, la saman kiun ni publikigas en tia-ĉi bulteno.

Tiu belaspekta kalendareto devas trovi lokon en ĉiu esperantista hejmo.

Ĝia neta prezo (sen gajno por la eldonisto) estas 2 fr. 50 plue rekomend-afranko (1 fr. 40).

Turnu vin al S-ro Delavigne, Longpré-les-Corps-Saints (Somme).

DELAVIGNE-POIRET, Imprimeur-Gérant  
Longpré-les-Corps-Saints (Somme) - France

## ANONCETOJ

Prezo de la anoncetoj:  
Unu linio kostas 2 frjn.  
Favoro al niaj abonantoj:  
Ĉiu abonanto rajtas enpresigi senpage anonceton (tri linioj) unu foje en la jaro.

Sin turni rekte al la Presisto de Nordfranca Esperantisto en Longpré-les-Corps-Saints (Somme).

**VENDOTA**, en tre bona stato:  
NOVA UNIVERSALA VORTARO  
Maurice Lachatre  
(2 volumoj) - Eldonita en 1865

Sin turni al la Presisto de N.E.



## PROBABLAJ PROGRAMOJ DUM DECEMBRO 1936

(Horoj laŭ franca vintra tempo (G. M. T.))

### Ĉiusemajnuij dissendoj

#### DIMANCE

9.00-9.15 Radio-Kortrijk 204 m. E. kroniko.  
9.40-10.00 Lille, 247 m. Parolado, kurso kaj informoj, de F-ino Andrée kaj S-ro R. Curnelle.  
10.46- Lyon P.T.T., 463 m. Kurso.  
13.00-13.15 C. T. 3 A. Q. (Funchal) 75 m. Inf.  
21.20-22.20 Leningrad, 1293 m. Literaturo-muzika vespero.

#### LUNDE

14.40-15.00 Wien, 506 m. kaj ĉiuj aŭstriaj stacioj. Kurso.  
17.30-17.35 Genève-Sottens, 143 m. Kurso.  
18.20-18.50 Radio-Lyon, 215 m. Kurso.

#### MARDE

17.00-17.15 Moravska Ostrava, 269 m. Paroladoj pri Ĉeĥoslovakujo.  
19.00-19.10 Tallin, 410 m. Pri Estonio.  
19.00-19.20 Hilversum II, 1875 m. Kurso.  
21.40-21.00 PRA-3 (Rio de Janeiro), 366 m. Kurso.  
21.45- LV-2 (Cordoba). Informoj.  
22.30-22.45 PRF-5 Rio de Janeiro, 31 m. 58. Ekonomiaj informoj kaj kantoj.

## MEKKREDE

14.00-14.20 Paris-P. T. T., 131 m. - Alpes-Grenoble, 514 m. - Limoges-P. T. T., 335 m. - Nice-La Brague, 253 m. Kurso (C. Rousseau).  
20.00-20.15 L.T.J. Radio del Litoral (Rosario) Informoj.  
20.10-20.30 Barcelona, 42 m. Informoj.  
20.30-20.45 C. T. 3 A. Q. (Funchal) 75 m. Inf.  
21.50-22.20 Leningrad. Parolado.

## ĴAŬDE

20.45-21.00 Radio-Kaunas, 207 m. Informoj.

## VENDREDE

20.30-20.45 C. T. 3 A. Q. (Funchal) 75 m. Inf.  
20.45-21.00 Radio-Klaipėdė, 531 m. Informoj.  
21.50-22.20 Leningrad. Parolado.

## SABATE

18.05-18.20 Roma, 420 m. Priturisma parolado 2 R.O. (Rome) 31 m. 13. Relajso de Roma.  
20.10-20.30 Barcelona, 42 m. Informoj.

Tous les membres de la Fédération peuvent recevoir gratuitement chaque mois la liste des émissions espérantistes du délégué fédéral, M. Maurice Nogé, 21, rue Maréchal-Joffre, Dunkerque.

## ...ET VOICI LES ÉTRENNES!

Le Poste que vous possédez ne vous permet pas l'écoute de toutes les émissions espérantistes ?

Remplacez-le par le Poste "RENOVOX"...

Voir annonce, page 4 de la couverture.

## NIA GAZETO

monata esperanto-eldono de  
*L'Eclaireur de Nice et du Sud-Est*

Redakcio-administracio: 29, avenue de la Victoire, Nice.

Direktoro-ĉefredaktoro: Georges Avril.

Ĝi estas nuntempe la sola vere sendependa Esperanto-gazeto tre malmultekosta (jar-abono: 10 frk) Tiu prezo ne estis altigita spite de la « mona rektlinigo »; ĝi enhavas en ĉiu numero pli ol 3000 liniojn da legajoj, tre diversaj kaj ege interesaj.

ESPERANTISTOJ, ABONU ĜIN.

## Vient de paraître L'Espéranto en douze leçons

par Pierre DELAIRE  
professeur diplômé par la SFPE

(Les versions et thèmes suivis ont pour but de ne pas ennuyer l'élève, ce dernier jouit d'ailleurs d'une certaine satisfaction lorsqu'il a traduit un petit texte, satisfaction qu'il n'éprouve pas lorsqu'il a traduit des phrases séparées qui n'ont aucun lien commun.)

Prix: 5 francs

Esperanto-Office, 63, rue de Patay, Orléans

## Nordfranca Esperantisto

est envojé  
chaque mois

à titre de propagande, à de nombreuses Sociétés, aux Syndicats d'Initiative, aux Chambres de Commerce, aux principaux Fonctionnaires, Consuls, Négociants, Industriels, Hôteliers, Coiffeurs, à de nombreux Groupes Esperantistes de France et de l'Étranger.

Enit un service régulier d'échange avec les autres journaux.

**SI** vous faites insérer une annonce à cette place, elle sera certainement remarquée.

**PETITE DÉPENSE  
GROS PROFIT**

Tous renseignements :

Imprimerie de "Nordfranca Esperantisto"

## HOTELS RECOMMANDÉS

à **ABBEVILLE** :

### HOTEL DE FRANCE

Rue de l'Hôtel-de-Ville

**DINGUARD**, Propriétaire

Téléphone 42

à **AIRAINES** (Somme) :

### HOTEL DE L'ÉCU DE FRANCE

Place Aristide-Briand

**R. TUEUR**, Propriétaire

Téléphone 17

## N.E. por vivi nepre bezonas ANONCOJN

Samideanoj, kiuj rilatiĝas kun gravaj komerc-firmoj, ĉe kiuj ili povas akiri anoncojn estas insiste petataj sin konigi al la Administracio de N.E., donante ĉiujn sciigojn

## RADIO-APARATO « RENOVOX »



Preziza reguligo

Bela aspekto

ALTRVALITA MATERIALO

6 lampoj

ĈIAJ ONDOJ

Variabla Selekteco

Amerikaj lampoj

Mezgrandaj frekvencoj

(kun feraj)

465 kilocikloj

Antaŭ-selektigilo efika

Diverskolora ciferpilato

7 kaj 14 kilocikloj po komutatoro

Luma akord-indikilo

Duobla toneto - Elektro-dinama

Grandmodela laŭtparolilo, haviganta

nekompareblan muzikecon, kiu igas tiun

modelon vera radio-aparato de muzikantoj

**PREZO : 2.035 FR.**

10 % -a rabato por N.E.-abonantoj

Anciens Etablissements

**Lavoix & Renouard**  
49ter, Rue d'Arras -- DOUAI

## PORTO VASMONTÉ

H. DE VASCONCELLOS, O. PORTO

Agent général : C. DOLPHENS

39, rue Gustave-Jonequet, à LILLE